


Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

“Fantomrakontoj” en libro!

Sibayama Zyun'iti



En februaro 2026, eldoniĝis esperantigita “Fantomrakontoj”, libro entenanta la fantomrakontojn japanajn, rerakontitajn de Lafcadio Hearn en la angla lingvo. La libro estas 118-paĝa en A5-formato, kaj kostas

2300 enojn (plus imposto en Japanio).


Fakte, la duono, nome 9 rakontoj estis tradukitaj de Iĉimura Ŝiroo, kaj aliaj 8 estas tradukitaj de mi: pri tio mi jam skribis en la 2025-a julia n-ro de tiu ĉi “Novaĵoj Tamtamas”. Unu el ili, ‘Ĉerizarbo Mamnutristina’ aperis en la 2025-a aprila n-ro de tiu ĉi organo.

Lafcadio Hearn orele aŭdis japanajn malnovajn rakontojn de edzino Secu, edziniĝinta en Japanio. Kaj li rerakontis ilin en la angla lingvo kelkfoje miksante japanlingvajjn vortojn kun anglalingvaj notoj. Tiuj vortoj estis en tiu ĉi eldonaĵo esprimataj kun esperantlingvaj notoj: kiom tio sukcesis, mi petas vian juĝon, legante tiun ĉi libron.

Unu el la plej famaj rakontoj estas ‘La rakonto de Hooiĉi-Senorela’, nome kial blindulo kun muzikinstrumento bivo perdis siajn orelojn. Tiu rakonto mem estis unu el la klasikaĵoj en la

japana literaturo, sed nun multaj japanoj konas ĝin, kredeble laŭ la traduko en la japanan de tiu de Lafcadio Hearn. (En la foto: statuo de Hooiĉi-Senorela en Urbo Ŝimonoseki, kie tiu afero okazis: mi fotis en vojaĝo en 2025).

Alia fama rakonto estas ‘Muĝina, aŭ melo’, nome japanoj kredis ke besto muĝina (melo) metamorfozas sin en aliaĵon kaj trompas homojn. Tiun ĉi rakonton oni utiligas en anglalingva lernolibro por japanoj, kaj mi antaŭ



jardekoj lernis tion. Sed laŭ mia serĉo, trovita ‘lernolibra Muĝina’ estas tute simpligita versio, ne la originala anglaĵo de Lafcadio Hearn. Kompreneble la ĉi-foja traduko estas fidela al la originalaĵo.

Niaj klasoj

***erikoj**: gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en merkredo, 13:30-15:30. Oni legas nefikciaĵon “Homoj manĝantaj” de Hemmi Yo, tradukitan de Doi Ĉieko.

***Punkuino (eksa klaso: Homoj)**: gvidas Doi Hirokaz, ĉe la Muzeo, en sabato de 13:30-15:30. Oni finis legi nefikciaĵon “Homoj manĝantaj”, kaj de la 28-a de februaro, oni legas nepalan legendaron “Punkuino”.

***Jokohama Salono**: sen gvidanto, per reto-programo Jitsi, en sabato, 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton oni kune legas libron, nome “Ĵim’ la migrulo” de Siegfried Stampa. Temas pri la vivo de leopardo en Suda Afriko.

La 2-an sabaton oni interkritikas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni interkritikas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

***Teksanto**: gvidas Doi Ĉieko, per Jitsi, en lundo. Oni nun legas “Kredu min, Sinjorino!” de Cezaro Rossetti.

***Verse**: gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo. Oni legas “Vere aŭ Fantazie” de Claude Piron.

Okazis

El Koreio, Mondero vizitis nin

Vizitis nian Esperanto-Muzeon Jokohaman korea junulo Mondero (s-ro SHIN Hyunkyu), en la 4a de februaro. Li tagmanĝis kun ni, kaj ĝuis la atmosferon de la Muzeo. Li, studanta historion de korea Esperanto-movado, havis intereson pri la dokumentoj niaj pri la historio de E-movado en Koreio.

eĥo el Aŭstralio

Saluton,

Dankon pro via regula sendado.

Estas interese ekscii kiel vi preparas la bultenon. 4 paĝoj ne ŝajnas esti granda kvanto sed kiam temas pri regula laboro, mia sperto sciigas min ke necesas ĉiam pensi pri tiu tasko kaj esti atentema kiam aŭdiĝas io kio povas esti interesa. Estas bone ke temas pri kunlaboro de teamo. Sin apogi sur la aliajn kiam io neatendita okazas, permesas regulecon kaj malpezon por ĉiu kunlaboranto.

Amikajn salutojn, Franciska

<komento>

Fakte ni produktas 10-14 paĝojn monate, inkluzive de la japanlingva versio!

eĥo el Irano

Kara Redaktanto, kara sinjorino ,

Elkoran dankon pro la regula sendado al mi de Novaĵoj Tamtamas, kaj en la papera kaj en la reta versioj. Mi ĉiam kun intereso tralegas la periodaĵon kaj aprezas la zorgeman redaktadon kaj la interesan enhavon.

Laŭ la klarigo en la “Kiel ĉi tiu organo estas farita?” en la nuna numero, mi petas vin, ke estonte oni ne plu sendu al mi la paperan version; por mi tute sufiĉas la reta versio.

Mi sincere dankas vin pro via laboro kaj sindediĉo.

Ĉian bonon, Amike, Ahmad Mamduhi

<komento>

Ni ja sendos al vi nur la retan version.

URĜA KOMENTO : Al ni venis novaĵo, ke Usono atakis vian landon. Ĉu vi vivas sekure?

sezonvorto marta

Undario (vakameo) わかめ

Okita Kazumi

Undario estas bruna algo vaste manĝata en Japanio. Ĝi estas unu el la maralgoj, kiujn japanoj manĝas ekde antikvaj tempoj. Oni diras: “Miso-suppo kun undario estas bona por resaniĝo post akuŝo” kaj eĉ “medikamento por rejuniĝo”. Lastatempe ĝia dietiga efiko ankaŭ altiras atenton, kaj ĝi fariĝis populara ingredienco.

Precipe famaj estas vakameoj el Sanriku, Naruto kaj Izumo k.a.



eseo

Kik-skotero

Mizro Iwaya

Lastatempe mi havas malfacilon en piedirado. Jam antaŭ dek jaroj mi komencis havi ne-harmoniecon en miaj kruroj. Tia malharmonieco kreskis pli kaj pli lastatempe, kaj kiam mi iris al kirurgia kuracisto, li deklaris al mi ke mia simptomo estas "vertebra stenozo (脊柱管狭窄症)." Diable! Ĉu tio signifas ke mi fariĝis tiel maljuna?

Ĉiukaze estas fakto, ke mi ekhavas doloron ĉe la kruroj kiam mi iras longan vojon, ekzemple 1 km. La distanco varias laŭ la kondiĉoj. Kiam mi estas laca, mia irpovo malkreskas al 500 m. Mi devas ripozi momente por iri pluen. La distanco inter mia domo kaj la stacio Kanazawa Hakkei estas ĉirkaŭ 600 m, same kiel la distanco inter Muzeo kaj la stacio Idogaya. Do mi ofte havas malfacilon kiam mi iras tiun distancon. Kion mi povas fari kontraŭ tiu problemoj?

La plej facila solvo estas uzo de biciklo. Mi ne povas paŝadi longe, sed pedalado estas facila. Tial mi povas uzi biciklon se temas pri najbareco de mia domo. Sed kion mi povas fari se la celloko estas malproksima kaj mi ne povas uzi aŭton? Estas ne facile porti biciklon en vagonaron. Do prefereble mi volas uzi "malgrandan biciklon." Mi serĉis ĝin en interreto, kaj trovis ke ekzistas diversaj

biciklidaj veturiloj. Inter ili mia preferata solvo estis kik-skotero. Ĉu ĝi funkcias bone?



Mi aĉetis ĝin kaj provis ĝian utilecon. Estas certe ke mi povas veturigi ĝin adekvate. Ne atendata fakto kiun mi trovis post la ekzerco estas ke ĝi estas tre delikata veturilo:

- Tre eta deklivo de la vojo montras sin klare en akcelo/malakcelo de la skotero.
- Same malforta vento montras sin klare en akcelo/malakcelo de la skotero.
- Subtila malplateco de la vojsurfaco bone spegulas sin sur la skotero.

Ĝia pezo kaj longeco hezitas min kunporti ĝin en vagonaro, sed eble estas bone se mi elektas ne-svarman vagonaron. Mi certigis ke mi povas veturigi ĝin pli rapide ol piedirantoj. Do mi resumas respektivajn karakterojn jene. (Vidu la suban tabelon)

Mi povas diri ke kik-skotero situas meze inter paŝado kaj biciklado. Ĝia plej granda avantaĝo estas enporteblo al vagonaro. Mi komencis uzi ĝin kiam mi iras al Esperanto-Muzeo Jokohama, kaj konstatis ke supra diskuto estas prava. Do mi povas pli frekventi al la muzeo de nun. Gratulinde!

	paŝado	skotero	biciklo
pezeco	0	6kg	12kg
rapideco	4km/h	8km/h	16km/h
irebla distanco	600m	2km	5km


EL NIA MUZEO

Vivo de Zamenhof, homo de amo

En Esperanto-Muzeo Jokohama estas pluraj ekzempleroj de «Vivo de Zamenhof», verkita de Edmond Privat en 1920. Ĉi tie mi prezentas 2 ekzemplerojn, plej malnovajn.

La maldekstra foto montras la originan eldonon de Brita Esperanto-Asocio (BEA). En la supro ni legas : Libraro Bolingbroke-Mudie. Tiu Bolingbroke-Mudie estis la prezidanto de BEA, sed mortis pro aŭtomobila akcidento. Pro tio la libroserio estis nomita laŭ li. Sed en vivanteco, li kaj Edmond Privat estis bonaj konatoj, eĉ kamaradoj, ekzemple en strebado, por ke zamenhofa manuskripto de la Malnova Testamento estu publikigota de BEA.

La dekstra foto montras la tradukon en la japana, fare de Macuzaki Kacumi (松崎克己), eldonita en 1923. La libro havas titolon『愛の人ザメンホフ』, nome «Zamenhof, la homo de amo». Tiu Macuzaki estis junulo, naskita en 1901. Li edziĝis en 1924 kun f-ino Midorikawa Sumi, esperantistino, kaj en 1925, nomis sian filinon Lumi. Sed jam en 1926 li mortis pro malsano. Mi do povus nomi tiun tradukinton «la homo de amo».



«Bildoj pri Atombombo» - galerio kaj libroj



En la 6a de aŭgusto 1945, la unua atombombo detruis Urban Hiroŝima — Tiun tragedion bildigis ge-edzoj Maruki Iri kaj Maruki Toŝi (kiu lasta ankaŭ nomis sin Akamacu Toŝiko). Precipe famaj estas murpentraĵoj, ekspoziciataj en la Galerio Maruki en Gubernio Saitama (tamen la Galerio nun estas fermita por rekonstruado). La foto montras libron pri tiuj bildoj, eldonita en 1968, jaron post la malfermo de la muzeo.

Sibayama Zyun'iti

La bildoj pri atombombo estis ankaŭ uzitaj en multaj eldonaĵoj, precipe en 1950-aj jaroj, kaj ankaŭ en ties esperantigitaj versioj. Kaj ni, Esperanto-Muzeo Jokohama, posedas kelkajn el tiuj libroj, el inter ĉ. 40 esperantigitaj libroj pri atombomboj (pri tio vidu julian kaj novembran n-rojn en 2021 de «Novaĵoj Tamtamas»).

En la 13a de februaro, kuratoro de la Galerio Maruki vizitis nian muzeon, por esplori la esperantigitajn librojn kun la bildoj de ge-sroj Maruki. En la Galerio estas unu. Ĉe ni estas 3, kaj 2 libroj estas nek ĉe ni nek ĉe la Galerio. Sed tiam ni trovis, ke kelkaj esperantaj gazetoj en 1950-aj jaroj portas ilian bildon en la kovrila paĝo. Do ankoraŭ daŭros plua esplorado.